# TAMEN PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO NOVEMBRO 2006 / JARKOLEKTO 25

*Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*

*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*

***Tre malvarman vintran tagon iu preskaŭ surda sinjoro survojis al la pastro por ke tiu registru la naskiĝon de lia 12a infano. Dum sia irado li profunde pripensis tion, kion la pastro unue diros.***

***Verŝajne li diros "bonan tagon", pensis la surdulo. Poste li demandos "kiamaniere vi venis hodiaŭ, ĉar estas tre malvarmege?" Kiam li fine alvenis al la pastro okazis la jena konversacieto:***

***Pastro: "Bonan tagon!"***

***Surdulo: "Bonan tagon!"***

***Pastro: "Kion en la mondo vi faris por havi tiom da infanoj?"***

***Surdulo: "Ho, tre facile, mi nur kovris la orelojn per mia ĉapo kaj ekklopodadis!"***

## Edukado

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: "Lingvaj Resondoj".**



**Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.**

***"Vi laboris por fremda potenco!"***

***"Ne, tio neniel eblas, neniu potenco en la mondo povas laborigi min!"***

# Gravaj Esperanto-eventoj

**Merkredon la 1an de novembro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 15an de novembro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 6an de decembro ni celebros la 147an naskiĝdatrevenon de Zamenhof en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**La 22a Somerkursaro kaj Kongreso de A.E.A. okazos inter la 7a kaj 19a de januaro en Hobarto, Tasmanio.**

**La Kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio okazos de la 3a ĝis la 5a de februaro 2007. La Ekskurso dum Waitangi-Tago okazos la 6an de februaro!**

***Hejmen venas malgrandulo de la lernejo. Diras li al sia patro:***

***"Paĉjo, hodiaŭ mi estis tre malbona en la lernejo!"***

***"Ĉu vere, mia knabo, kion vi do faris?"***

***"Mi metis dinamiton sub la seĝon de la instruisto!"***

***"Ho, vi hontu, malbona knabaĉo, tuj iru al la lernejo kaj petu pardonon!"***

***"Al kiu lernejo?"***

# Biografio de Annie Gleeson

## Intervjuita de Katja

**Annie naskiĝis en Kimrujo, en ĝia ĉefurbo Cardiff.**

**Ŝia patro mortis antaŭ 10 jaroj, sed ŝia patrino Cath vivas kaj loĝas en Adelajdo. Annie estas la plej aĝa el la 4 gefratoj, ŝi havas du fratojn (Kevin kaj John) kaj 1 fratinon (Elle). La familio migris al Aŭstralio precipe por trovi pli varman klimaton ol estis en la hejmlando.**



**Ĉar la familio estis katolika, Annie ekstudis en la lernejo de Sankta Dominiko. Sekvis 2 studjaroj en Sidnejo kaj 3 en la universitato de Kanbero (1971-73) studante matematikon, sociologion, ekologion kaj la anglan. Intertempe, kiel 18-jara, Annie iĝis monaĥino kaj post la studado ŝi eklaboris kiel**

**instruistino en la sama lernejo, kie ŝi mem lernis, en Sankta Dominiko (restis tie 7 jarojn). Tiu laboro estis malfacila. "Tiam mi pensis, ke mi ne ŝatas instrui, sed nun mi scias, ke ne estis saĝe labori plentempe. En tiu parto de mia vivo mi estis tre laca."**

**Annie restis monaĥino 14 jarojn (1969-83). Eĉ se ŝiaj valoroj ne ŝanĝiĝis, la mondpercepto jes.**

**En la sekva vivperiodo ŝi estis memsufiĉa ĝardenisto. Kun amiko Simon kaj amanto John ŝi kreis "Pacĝardenon", en kiu ili kreskigis legomojn kaj fruktojn, kaj bredis abelojn. Ili havis eĉ propran tritikon, kiun ili mem muelis kaj propran olivoleon.**

**Kiel 36-jara ŝi renkontis Ashley, kun kiu ŝi feliĉe kunvivas ĝis nun en la hejmo "Seli-Hoo". Ĉar temas pri komunuma domo, Annie kunvivas ankaŭ kun Helen kaj Sandor kaj parttempe kun plia kvindeko da samideaj homoj. Tamen, Ash kaj Annie havas sian privatan dormoĉambron, konstruitan propramane el adobo. Ili decidis ne havi infanon. "Mi diris al mia amikino Mel: "Mi ne havos infanojn, sed eble mi helpos zorgi pri la infanoj de aliaj". Kiam poste Mel graveddiĝis, Annie iris kun ŝi al antaŭnaskaj lecionoj kaj poste helpis ĉe la nasko de Acacia. Annie kaj Ashley helpis ankaŭ en la edukado de la filino de Sandor kaj de Angeli, la filino de Elle, la fratino de Annie.**



**Malfacilaj estis tiuj 6 jaroj, kiam Annie suferis je kronika laceco. Du jarojn ŝi pasigis pli-malpli enlite.**

**"Mi pensas ke homoj, precipe amikoj, estas en la centro de mia vivo. En Kanbero mi renkontis Fran, monaĥinon, kiu iĝis unu el miaj plej proksimaj amikoj. Alia tia persono estas Jenny, kiun mi renkontis en virina spirita tendaro kaj kun kiu mi poste kunlaboris, kunmuzikis, loĝis kune…"**

**Kvar jarojn daŭris la periodo, kiam Annie vivis alterne po unu semajno en Adelajdo kaj en la kampara domo en Marble Hill. Rekompence ŝi, Ashley kaj Helen helpis la posedantojn de la uzataj tero kaj domo.**

**Annie nun instruas ekologion, matematikon kaj verkadon en TAFE. "Nun mi laboras parttempe. Mi instruas virinojn kaj tre ŝatas mian laboron."**

**Je la demando, kial ŝi lernis Esperanton, ŝi respondis: "Ĉar miaj amikoj ŝatas ĝin. La esperantistoj estas interesaj homoj."**

**Annie deziras al si mem bonan sanon kaj longan vivon kun Ashley. Ĉar ŝi verkas, la bela revo estas gajni premion pro literatura verko. Estu tiel, Annie!**

***"Sed, Trevor, ankaŭ via frato rajtas pruntepreni la glitveturilon, ĉu ne?"***

***"Jes, kaj tion li vere faras. Mi veturigas ĝin malsupren, kaj li tiras ĝin supren!"***

## Ĉu la plej unua romano?

**La biblioteko de "Esperanto en Sudaŭstralio" ricevis ion, kio verŝajne estas la plej unua romano originala en Esperanto.**

**Donacis ĝin Trevor Steele. Ĝia titolo estas "Sen Titolo". Verkis ĝin Ivan G. Ŝirjaev.**

**Ĝi temas pri la aventuroj de Esperanto-pioniro en Ruslando plej verŝajne dum la jaroj 1897 kaj 1898.**

***Estis religiinstruado en skota lernejo.***

***"Nu," demandis la instruisto, "kiun krimon faris la filoj de Jakobo?"***

***"Ili vendis sian fraton Jozefon!" respondis unu el la filoj de MacAdams.***

***"Ĝuste, kaj kontraŭ kiom da mono ili vendis sian fraton?"***

***"Kontraŭ dudek arĝentaj moneroj!"***

***"Kaj ĉu vi scias, kio igis ilian krimon eĉ pli aĉa?"***

*“Jes,” kriegis la tuta klaso per unu voĉo, tio estis tro malmultekosta!”*

# Pri la UK en Jokohamo en 2007

**En la japana retejo, kiu priskribas la venontan Universalan Kongreson de Esperanto en Jokohamo, oni aperigis kunligon al la paĝoj pretigitaj de Daniele Binaghi por prezenti Japanujon al vizitontoj.**

**“TraJapanio”, pere de 116 fotoj kaj ties priskriboj, rakontas pri dumonata vojaĝo tra la lando de la suno leviĝanta, kaj donas proponojn por pli bone profiti el sia vizito tie.**

**Jen la adreso de la japana retejo: http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/espe/jokohamo.htm. Eblas rekte viziti ankaŭ la ttt-paĝojn de traJapanio, ĉe http://www.pecorElettriche.it/esperanto/traJapanio/index.html. Pli da Esperantaj enhavoj troviĝas ĉe http://www.pecorElettriche.it/esperanto/default.asp.**

*Daniele Binaghi*

*“Mi serĉos aventurojn, ekscitiĝon kaj belulinojn!” diris la junulo forlasonta la hejmon, kie li kreskiĝis. “Mi foriros tuj, kaj vi ne provu haltigi min!”*

*“Certe ne!” kriegis la patro, “atendu iomete, mi kuniros!”*

# Esperanto en Eŭropo

**La 26an de septembro la Konsilio de Eŭropo publikigis en Esperanto oficialajn dokumentojn sur sia hejmpaĝo. Tio okazis okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj. Kune kun la Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj (Graz) la konsilio funkciigis dulingvan hejmpaĝon por informi pri la aranĝoj kaj por kunordigi la eventojn de la tago.**

**Legeblis pluraj artikoloj en la du oficialaj lingvoj. Tamen, en escepta kazo estis aldonita ankaŭ la germana, hungara kaj ĉeĥa lingvoj.**

**Danke al diplomatia taktikumado oni fine sukcesis atingi ke almenaŭ en iuj vicoj, kie jam estas aliaj lingvoj, oni sukcesis aperigi ankaŭ Esperantajn tradukojn.**

**Vizitu la sekcion TAGO de LINGVOJ en la paĝaro de www.edukado.net. Tie faru almenaŭ unu el la subaj ebloj:**

1) legu la erojn de la sekcio Instruu vian lingvon kaj kontribuu per opinio aŭ nova ero – tion vi povas fari en la sama parto aŭ en mesaĝo al redaktanto@edukado.net.
2) esprimu viajn pensojn pri la tago kaj ties celoj en la paĝo: Opinioj, mesaĝoj.
3) Legu la koncernajn informojn, dokumentojn laŭ via plaĉo, intereso kaj tempo.

Laŭ nia opinio ni jam atingis ion tre gravan. Ni faris grandan paŝon antaŭen sur la vojo de oficialigo de Esperanto ĉe politikaj instancoj. Ni havas ĉiujn bazojn por vere celebri la Tagon de Lingvoj.

*Katalin Kovats*

*Mi suspektas, ke mia edzo estas malfidela. Ni havas kvar gefilojn, kaj neniu el ili similas al li!"*

## La unua Lingvofestivalo dana

Okazis jam tiom da lingvofestivaloj en la mondo, sed neniam antaŭe en Danujo. Tial, la 23an de septembro, la prezidanto de la Esperanto-Klubo de Kopenhago, Kim J. Henriksen, aranĝis kune kun gestudentoj de la Universitato de Kopenhago kaj la Mondoklubo la lingvofestivalon.

La plej unua lingvofestivalo dana estas nun finita. Lingvofestivalo estas festo por multlingveco kaj internacia interkomunikado. Ni homoj kaj niaj lingvoj estas respektataj egale kie ajn en la mondo ni hazarde troviĝas. La plej unua lingvofestivalo okazis en Tuluzo, Francujo. Post tiam ili okazis en multaj aliaj lokoj de la mondo, sed ne en Danujo!

"Esperanto de Luxe" muzikis kaj kantis en Esperanto. Okazis litova kantado de kanzonoj, hispana dancado, latva popoldancado, kantado en la kurda, tamburado de groenlandanoj, pola poezideklamado, kaj multo alia.

Entute 25 malsamaj lingvoj prezentatadis!

*Policano haltigis aŭtomobiliston, tuŝetis sian kaskedon, kaj tre afable diris:*

*“Vi estas aŭtomobilisto n-ro 10.000 sur tiu ĉi vojo. Jen $ 1.000 por vi! Ĉu mi rajtas demandi, kiel vi elspezos la monon?”*

*“Mi intencas lerni veturigi aŭtomobilon”, respondis la viro ĉe la stirilo.*

*Lia edzino, kiu sidis apud li, diris:*

*“Ne kredu lin, li diras tiom da sensencaĵoj, kiam li estas ebria”.*

*Kaj ĝuste tiam la surda avo, kiu sidis en la malantaŭaĵo de la aŭtomobilo, diris:*

*“Ĉu mi ne diris al vi, ke ni ne venos tre malproksimen en ŝtelita aŭtomobilo!”*

## La filozofio de Jiddu Kriŝnamurti kaj Esperanto

**Jiddu Kriŝnamurti, unu el la plej grandaj spiritaj homoj, diris, ke la ĉefa tialo de mizero kaj pacmanko en nia mondo, estas la iluzia identeco de homoj kun ties ekstera egoo anstataŭ kun ties esenco. Ĉar la esenco de ĉiu homo ne estas ligita al ajna identiĝo, kiel ekzemple identiĝo kun specifa nacio, specifa religio ktp., konsekvence okazas divido inter homoj.**

**Por alporti harmonion inter la diversaj homoj, tre bona rimedo de kunigo, povas esti komuna lingvo, kiel Esperanto. Sed la plej grava faktoro por tiu harmonio estas plena konscio.**

**Eĉ la intenco malantaŭ la uzado de komuna lingvo kreas influon en la direkton de la unuigo homara, spirite kaj fakte.**

**Jen paragrafo el libro de Kriŝnamurti, “Libere de la konoj”, esperantigita de Yves Bachimor:**

**“Ni vivas fragmentigitaj. Vi estas iu persono oficeje kaj iu alia hejme; vi parolas pri demokrateco, sed en via koro vi estas aŭtokrata; vi parolas pri amo al via najbaro, tamen vi mortigas lin per konkurado. Unu parto el vi funkcias kaj observas la vivon, aparte de viaj ceteraj partoj. Ĉu vi konscias pri tiu fragmenta ekzisto en vi mem? Kaj ĉu eblas al cerbo, kiu disrompis sian propran funkciadon, sian propran pensadon en fragmentojn – ĉu eblas al tia cerbo konscii pri la tuto, ke eblas rigardi la tutan konscion plene kaj tute, alivorte, esti plena homo?**

*Ora Hofman*

*"Kaj kiel aspektis via edzo, kiam li malaperis?" demandis la policisto. Li surhavis brunajn ŝuojn, brunan pantalonon kaj ruĝan antaŭtukon kun blankaj punktoj!"*

# La oktobra ondo en la reto

**Aperis la oktobra kajero de "La Ondo de Esperanto". En ĝi estas, apud pluraj primovadaj artikol(et)oj, pli ampleksaj tekstoj: nekrologo de István Ertl pri William Auld, intervjuo kun interlingvisto Aleksandr Duliĉenko, klarigo de Toño del Bario pri la hispanaj nomoj, komentario de Dafydd ab Iago pri malŝparado en EU pro tradukado. En la ampleksa kultura rubriko estas originala novelo de Jean-Marie Ries, artikolo de Wolfgang Kirschstein pri la konsterna konfeso de Günter Grass, du recenzoj, revuo de Flo Martorell pri la muzika kongressezono en Esperantujo kaj kelkaj etaj informoj.**

**La enhavtabelo kaj kelkaj tekstoj estas legeblaj rete ĉe http://www.esperanto.org/Ondo per musklako sur la titolpaĝo de la revuo.**

*Inĝeniero respondeca pri vojlaboro eniras la oficejon de sia estro:*

*"Tiu ĉi estas senespera tasko, estro. La laboristoj staras en koto ĝis la adampomo"*

*"Sensencaĵo. Vi nur skribu rekvizicion pri tio, kion vi bezonas. Tiam vi povos eklabori."*

*Iom poste eniras la oficejon la inĝeniero kun rekvizicio en sia mano:*

*"Jen mi rekvizicias dudek virojn, kiuj mezuras minimume tri metrojn!"*

# Ĉokolado kuracas ĉiujn malsanojn

**Kelkaj – almenaŭ 6 sudaŭstralianoj intencas preni parton en la Somerkursaro en Hobarto. Unu el ili, Eileen Jones, kunportos ĉokoladon disdonotan al ĉiuj, kiuj ĉeestos.**

**Ŝi kunportos ĉokoladon por ĉiu, ĉar ĉokolado pacigas militemajn spiritojn. Sed krom tion, ŝi kunportos ankaŭ bonajn dezirojn pri paco, harmonio, bona kunlaboremo kaj plej grave, bonan humoron!**